

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
PRIEURE SAINT-MARTIN

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN  
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL  
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE  
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE  
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d' Orves 54490 PIENNES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n<sup>o</sup>: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

+++++

==== N<sup>o</sup> 175 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== DECEMBRO 1992 ====

+++++

N. B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ  
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

## LE MOT DU PRESIDENT

Fin avril 1993, notre association se rendra en pèlerinage à Lourdes, comme elle le fait tous les cinq ans. Ce sera l' occasion, pour chacun d' entre nous, de placer notre travail et nos efforts d' apostolat au moyen de l' Esperanto entre les mains de la Vierge de Massabielle et de prier sur la tombe de l' abbé Emile Peltier, fondateur de notre mouvement.

Alors que le monde se débat dans les difficultés que chacun découvre dans son journal quotidien, nous confierons à la Vierge notre idéal de paix et d' amitié entre les peuples et demanderons l' aide divine pour le réaliser au moyen de la Langue Internationale.

Déjà en 1989, nous nous sommes réunis à Nevers pour nous recueillir sur les lieux où S-te Bernadette Soubirous a passé de nombreuses années dans la prière, l' humilité et l' obéissance. Comme elle, nous aurons à coeur d' accomplir, avec courage et persévérance, tout au long de notre vie, notre tâche de chrétien et d' esperantiste, sachant que nos efforts pour propager notre idéal et notre Foi se font aussi dans la prière, l' humilité et l' obéissance à la volonté divine.

En attendant de nous retrouver nombreux et priant sur les bords du Gave, je souhaite à tous nos membres une bonne et sainte année 1993.

A.B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Fine de aprilo 1993, ni pilgrimos al Lourdes, kiel ni faras ĉiun kvinan jaron. Ĉiu kaptu la okazoŝ por meti sian laboron kaj siajn peresperantajn strebojn en la manojn de la Virgino de Massabielle, kaj preĝi ĉe la tombo de P-ro Emile Peltier, fondinto de nia movado.

../...



KOMUNA KRISTANA KONGRESO EN VELENCE (Hungario) (18-25/7/1992)

Finfine la edziĝfestoj!

De 24 jaroj (ĉu pro dismovo de la homamasoj en 1968?), ambaŭ kristanaj Esperanto-asocioj, la protestanta KELI kaj la katolika IKUE, akordiĝis por kune starigi sian ĝeneralan kunvenon ĉiun duan jaron. Ekde tiam, oni kuniĝis, reciproke sin taksis, precipe rekonis unuj la aliajn kiel gefratojn en la amo de la sama Sinjoro. Kaj la Sankta Spirito, kiu, tra eraroj kaj mallertaĵoj, profunde refaras unuecon sine de la varieco de Di-donoj, siaj donacoj, ŝajne invitas nin, kristanajn esperantistojn, al vigla antaŭenirado en espero sur la vojo de unueco.

Ĉijare, la "Komuna Kristana Kongreso" okazis en Hungario (Velenco) ĉirkaŭ 30 km sud-okcidente de Budapeŝto, de la 18-a ĝis la 25-a de julio, tuj antaŭ la UK, kiu okazis en Vieno de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto.

La kongresejo situanta borde de Velenco-lago, estas ripozdomo por laboristoj, sufiĉe komforta; longtempe ĝi servis al la soveta armeo.

Ni estis 122, inter kiuj 2 el Usono, 1 el Malajzio, multaj el orienteŭropaj landoj. Eble duono estis katolikoj, la ceteraj protestantoj kaj ortodoksoj el diversaj konfesioj. Nur la organizantoj sciis pri la religia apartenado de ĉiu, krom pri pastoroj aŭ pastroj; kaj tra la konversacioj eblis ekscii pri tio.

Preĝo kreis specialan etoson; ankaŭ gregoriaj melodioj adaptitaj de kelkaj germanaj benediktanoj, specialistoj pri ĉantado, multe helpis al nia preĝado. Pluraj protestantoj estis mirigitaj, ĉar ili povis preĝi, ĉefe por la psalmoj, per la "Nova Latino" kaj tiaj melodioj; tiu lingvo donis al ĉiuj komprenon (sen speciala karismo de interpreto) de la komuna preĝo, portata de tiuj belegaj kantoj (ekz. Salve Reĝina), alvenintaj de tiel malproksime, de tiom da jarcentoj!

Ni memoru unu el la demandoj de Martin Luther: ke la popolo povu kompreni la Vorton de Dio, ĝin ricevi en sia lingvo (vd. la unuan germanan Biblion). Tiam, la latino de la kleriko estis malfacilaĵo por la kristana popolo; ĉu la "Nova Latino" ne povus esti taŭga komunikilo kaj interkonsenta rimedo por pli ekkonscia preĝo kaj komunio?

En Velenco, la plej gravaj momentoj estis la matena kaj vespera preĝoj. Tute apude staris la templo de la vilaĝo kaj la katolika preĝejo. Dimanĉon la 19-an de julio okazis matene la meso de la katolikoj, kun protestanta, ĉeesto, kaj posttagmeze protestanta diservo kun prezentado de nova orgeno donacita de nederlandanoj al tiu hungara protestanta paroĥo. Tiam mi alvenis neakurate, dum tiu celebrado, unu tagon malfrue; sed mi povis tuj kuniĝi kun la kantistoj. De unu jaro, mi posedas "Adoru kantante", kantarono de la protestantoj en Anglio, Nederlando, Germanio, Norvegio kaj Svedio, kiuj kune kompilis kaj eldonis ĝin en 1971. La katolikoj ankoraŭ ne havas ion similan; eble ekzistas apartaj eldonoj en diversaj landoj. Mi konas nur la francan "Kantikaro", malriĉe eldonitan, hektografitan en 1976. Deiss estas speciale tradukita kaj ŝatata en Esperanto k.a. lingvoj.

La tuta semajno pasis kiel fulmo, kun paroladoj de orientaj kristanoj: ĉeĥoj, litovoj, ukrainoj, poloj, kiuj rakontis kiel ili eltenis kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj malfeliĉoj. Sed mi kune devas nin turni al la estonteco: kiel harmonie kunlabori pli efike, inter kristanoj de la eks-komunistaj landoj kaj tiuj de okcidento? Kiel fari pri ekologio, respekto de la kreado por organizi ĝin, ĉar tia estas nia kristana alvoko: meti la mondon je la servo de Dio kaj pro Li je la servo de niaj fratoj. Pri tiu temo, ni aŭdis paroladon de hungarino, edzino de pastoro, speciale lumigan kaj konkretan; mi petis ŝin sendi al mi la ĉi-teman kasedon. Ankaŭ klarigo pri la Genezo fare de protestanta ekzegezisto tre plaĉis al mi pro sia klareco kaj lia erudicio metita je ĉies dispono.

Okazis apartaj babiladoj, por katolikoj, por protestantoj, grupoj pri diversaj interesoj, kiel kanto, helpo al blinduloj, studado de Lima liturgio. En 1982, teologoj oficiale komisiitaj de siaj eklezioj (inkludite de la katolika) provis starigi akcepteblajn tekstojn por ĉiuj pri eŭkaristio, kaj mi opinias ankaŭ pri aliaj sakramentoj. Tiuj tekstoj estas nun proponitaj je la ekzameno de diversaj ekleziaj aŭtoritatoj, kiuj nenion decidis, almenaŭ la katolika. En Romo, kuinte, oni bezonas tempon; sed la Lima grupo ŝajne faris bonan laboron.

Merkredon la 22-an de julio, ni vizitis la ĉirkaŭaĵon. Unue, la lulilon de Hungario, reĝolando kun reĝo S-ta Stefano, t.e. Szekesfehervar: en tiu urbo, kiel en Reims, la reĝoj estis kronataj. Sur la reirvojo, ni vizitis Gorsium, konstruitan sur romia kampo, nun nur ruinoj. Iam ĝi estis fortikaĵo de Panonio, regiono, kie naskiĝis S-ta Marteno, je la limo de la Romia Imperio. Plezure mi vidis, ke tie oni daŭre celebras tiun, kiu iĝis katekisto de la Gaŭlo-romianaj kamparoj kaj la plej konata patrono de francaj vilaĝoj.







Mia filo, mia juvelo  
 kiel birdido vi elŝeliĝas  
 Ĉu vi sukcesos?  
 Face adoltiĝu...  
 Ne vanu...  
 La dio estas kaj via patrino kaj  
 via patro,

kaj lia maniero vin prizorgi estas seneĝala  
 kian li amas vin  
 nek mi via patro, nek ŝi via patrino  
 vin amas kiel li  
 kompreneble, ĉar li prilaboris vin  
 kaj decidis, ke vi estu.

Nur li donis al vi la vivon.

Indiana poemo, kiun patro verkis antaŭ 1492 por sia novnaskita filo

Laŭ franca teksto esperantigis R. DEGRELLE

~~~~~

KONGRESA PROGRAMO

Merkredon, la 14-an de aprilo 1993

- 16.15: kongresa malfermo
- 17.00: diservo
- 20.30: interkona vespero - kantekzercado

Ĵaŭdon, la 15-an de aprilo

- 9.30: prezentado de la kongresa temo (P-ro Bourdon)
- 10.30 : paŭzo
- 10.45: diskutado kaj konkludo
- 15.30: preĝo ĉe la tombo de P-ro Emile Peltier
- 17.30: diservo
- 20.30: lingva vespero

Vendredon, la 16-an de aprilo

- 9.30: komitatkunveno  
 por la ne-komitatanoj, libera tempo por vizito al la urbo
- 15.15: vizito al Cité St-Pierre (libervola)
- 17.30: diservo
- 20.30: internacia vespero

Sabaton, la 17-an de aprilo

- 9.30: ĝenerala kunveno
- 11.30: komitatkunveno
- 14.00: ekskurso al Bartrès
- 17.30: diservo
- 20.30: lumprocesio

Dimanĉon, la 18-an de aprilo

- 9.30: partopreno en la Lourdes-diservo
- 15.00: procesio de la malsanuloj - vizito al la groto
- 20.30: distra vespero

Lundon, la 19-an de aprilo

- 9.30: kongresa fermo
- 10.30: diservo



AL LA LEGANTOJ

Neniam venas al la redakto la plej etaj rimarkoj, sugestoj, kritikoj pri nia bulteno. Ĉu ĝi vere estas tiel ideale perfekta? Certe na, kaj grave helpus al la redaktorino iuj ajn skribaĵoj el la estimataj legaĵoj. Aŭ eble ĉi tiuj tute ne legas la bultenon... tian veindan eventualaĵon mi apenaŭ kuraĝas imagi, kaj tamen... Provu dum kelkaj sekundoj meti vin antaŭ redaktorran tablon tute malplenan kaj demandu vin per kio vi povos plenigi 6 aŭ 8 paĝojn per...nenio. Jen estas mia nuna situacio. Mi detegas vin, sendu artikolojn, raportojn pri interesaj vizitoj, ekskursoj, vojaĝoj, novaĵojn pri via familio (naskiĝoj, geedziĝoj, forpaso), vi certe havas ion interesan por sciigi al la aliaj. Iom cerbumu kaj sendu al mi la rezulton. Mia adreskuŝas sur la frontpaĝo. Antaŭdankon.

J. VINCENT

\*\*\*\*\*

KOTIZTABELO 1993

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F  
Peranto: P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY. 2 555 38 L.

-----

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F  
geedza paro 50 F  
infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F  
bonfaranto 200 F

-----

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 260 F  
U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 275 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

\*\*\*\*\*

ENHAVO

- |                                 |                        |
|---------------------------------|------------------------|
| 1. Le mot du président          | Pilgrimo al Lourdes    |
| 2. Ĉefmirindaĵo                 | 6. Indiana poemo       |
| U.K. en Vieno                   | Kongresa programo      |
| 3. Kristana kongreso en Velence | 7. La folio            |
| 4. Protokolo komitatkunveno     | Aliĝilo al la pilgrimo |
| Horaro de la trajnoj            | 8. Al la legantoj      |
| 5. La katedralo S-ta Giaciano   | Kotiztabelo            |

\*\*\*\*\*

|                                  |                                              |
|----------------------------------|----------------------------------------------|
| Dépôt légal: 4ème trimestre 1992 | !! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le |
| C.P.P.A.P. n° 62 532.            | !! 6 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur |
| Directeur: Albert BESSIERE       | !! sous le n° 2523 bis-J.O. 23/05/1977)      |
| Directeur-délégué:               | !! au prieuré St-Martin                      |
| René-Jean MARMOU                 | !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE                 |
|                                  | !! FRANCE                                    |